

ILEI raportas

2014-07-01

Raportas la prezidanto pri ~ trimonata agado 2014-04-15 ĝis 2014-07-01

Enkonduka rimarko

Foje ni devas raporti de la unua de januaro ĝis la 31^a de decembro. Foje ni devas raporti de Konferenco al Konferenco, do de julio al julio. Pro tio mi raportis kaj raportos ĉiun trian monaton. Tiel mi povos puzzle kunmeti la bezonatajn raportojn laŭ la bezono.

Forgeso en la raporto januaro-aprilo 2014

Okazis ekzamensesio de Internaciaj Ekzamenoj (IE) de ILEI/UEA en Kotonuo, Benino, dum la Kvina Afrika Kongreso de Esperanto

Revuoj

IPR plu evoluas, laŭ mia konstato en ordo. Mi aŭdas pozitivajn reagojn, ne negativajn. Eble negativaj rimarkoj ne atingas miajn orelojn (!). Mi provas gajigi la aspekton kaj aldoni iom pli da fotoj.

JA fartas bone, laŭ mia konstato en ordo.. Mi aŭdas pozitivajn komentojn.

47a Konferenco 2014 en Urugvajo

Preparlaboroj okazas.

Mi skribis al Sinjorino Bokova, ĝenerala direktorino de Unesko, por peti aŭspicion de Unesko por nia Konferenco. Je 2014-06-30 mi ricevis respondon: Ne, ĉar la nacia urugvajna Unesko-Komisiono donas aŭspiciojn.

Partoprenontoj ne abundas. Ni provis diversajn strategiojn por arigi pli da homoj... ni vidos... Granda parto de la estraro de UEA kunvenos en Montevideo samtempe, antaŭ UK. Estos bona okazo interŝanĝi informojn kaj ideojn.

48a Konferenco 2015 en Belgio

Ĝi okazos en Oostende, Belgio, antaŭ la centa UK en Lille, Francio. Agema loka grupo eklaboris kuraĝe kaj efike.

Vivo de la Ligo

Estraranoj laboras iom aŭ multe, depende de diversaj faktoroj. Kelkaj aspektoj malfruas, ni povas esti pli bone akurataj. Ni devas.

Mi sendis salutmesaĝojn al 8 organizantoj de eventoj, kursoj, kongresoj

Kresko

Komence de la jaro 2014 ILEI havis piedon en 60 landoj per adiciado de la sekcioj (35), de la reprezentantoj (12) kaj de la kontaktpersonoj (13). Nun okazis kresko al 62 landoj. Ŝajnas, ke la Komitato voĉdonos pri akcepto de 4 novaj sekcioj. Do ni vidas grandan intereson tra la

mondo labori kun ILEI, por ILEI. Tio estas tre pozitiva aspekto. Novaj individuaj membroj aliĝis.

Retejoj

www.ilei.info funkcias.

Pri www.ilei-mondo.info venos granda laboro. Tie regas malordo en la enhavo kaj malordo en la disdono de laboro. Ne kontentiga situacio. Ĉar ni uzos ĝin por la aliĝoj por la TM kolokvo, tiu laboro urĝas. Taŭga solvo mankas ĝis nun.

Tutmonda kolokvo pri Instruado de Esperanto, 13n ĝis 16an de majo 2015 en Svislando

La 30an de aprilo la invitleteroj foriris. Kolokva Organiza Komitato konsistas el 3 personoj, tio ne sufiĉas. La rilato kun eblaj prelegantoj ne ankoraŭ okazis, ĉar la membroj de la laborgrupo pri tiu aspekto havas pli urĝajn taskojn. Unu tasko venos: rilati kun prelegantoj pri teknikaj aspektoj, peti la resumojn por aperigo antaŭ la kolokvo, post la kolokvo prepari la kolokvan resumon (aktoj).

Muzeo pri historio en La Chaux-de-Fonds renoviĝas nun. La gvidantoj zorgas pri tradukoj de la enhavo al diversaj lingvoj : it, es, pt, tr. Mi proponis eon. Ili jesis. Nia tradukisto ricevos la saman dankmonon. Tio estas grava agnosko. Ni provos liveri esperantlingvan enkondukon pri iliaj prezentoj al diversaj aliaj muzeoj en la regiono. Tio estas pozitiva kromefiko de la Kolokvo. Alia kromefiko estas dulingva rubriko fr eo en senpaga gazeto, kiu aperas kvarfoje jare ; mi verkas ĝin.

Kontaktoj kun movadaj establoj

Kontaktoj kun UEA kaj TEJO estas kvazaŭ ĉiutagaj.

Granda atento iras nun al la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM en Poznan, Pollando. Mi estas en laborgrupo pri tiuj studoj. Ĉar nova starto okazos en septembro por tri jaroj, la tikla momento de arigo de minimume 15 partoprenantoj okazas ĵus nun. Do anoncoj, informoj, varbiloj, monpetoj, jen nia strebado nuntempe.

Propono de samtempa kongresumado venis el Esperantotur el Bydgoszcz, Pollando, por julio 2015 en Oostende, nia 48^a Konferenco.

Kontakto kun ekstermovadaj establoj

Kontaktoj okazas kun ALTE (mi partoprenis dutagan kunsidon de tiu establo), kun Unesko kaj ĝia NRO-liga oficejo, kun Unio de Internaciaj Asocioj (UIA), kun la programo Erasmus de Eŭropa Unio, kun Afrika Unio por diskonigi programon al junuloj.

La problemo pri la prezo de tiaj partoprenoj ne estas solvita. Plej ofte ni partoprenas aŭ pagante mem niajn kostojn, aŭ uzante okazon, ĉar iu estas en la loko de la kongreso, aŭ ni sendas iun personon... iom amatora organizado. Ĉar mankas mono.

Finaj rimarkoj

Mi devas tute japanece pardonpeti, ĉar en majo kaj junio mi donis prioritaton al mia fina laboraĵo por UAM, Poznan. Mi defendos mian “tezon”, “eseon”... en septembro. Do poste mi povos dediĉi pli da tempo al ILEI ol nuntempe.

2014-06-29

Mireille Grosjean

Prez de ILEI